

Unua: Evangelioj kaj Mortotuko

Marko:

“Kaj li aĉetis tolaĵon, kaj deprenis lin kaj envolvis lin en la tolaĵo, kaj metis lin en tombon, kiu estis elhakita el ŝtonego; kaj li alrulis ŝtonon al la enirejo de la tombo...” (15,46)

Mateo:

“Kaj Jozef prenis la korpon, kaj envolvis ĝin en pura tolaĵo” ...(27,59)


Luko:

“Kaj Jozef prenis la korpon, kaj envolvis ĝin en pura tolaĵo...” 24,12)

“Sed Petro leviĝis kaj kuris al la tombo, kaj kliniĝinte, vidis la tolaĵojn solajn, kaj li foriris, mirante en si pri tio, kio okazis....”(23,52)

Johano:

“Kaj ambaŭ ekkuris kune; kaj la alia disĉiplo kuris antaŭen pli rapide ol Petro, kaj unua alvenis al la tombo; **5** kaj kliniĝinte, li enrigardis, kaj vidis la tolaĵojn kuŝantajn; tamen li ne eniris. **6** Kaj poste venis Simon Petro, sekvante lin, kaj eniris en la tombon; kaj li vidis la tolaĵojn kuŝantajn, **7** kaj la viŝtukon, kiu estis sur lia kapo, ne kuŝantan kun la tolaĵoj, sed kunvolvitan en aparta loko. **8** Tiam eniris do la alia disĉiplo, kiu unua alvenis al la tombo, kaj li vidis kaj kredis ...” 20,4-8)



Dua: La bildo

Je kio estas konstituita la bildo videbla sur la Morttuko de Torino, se en ĝi ne estas iu ajn formo de koloro aŭ pigmento homa, besta aŭ vegetala? se ĝi ne estas iu subtila brulada ŝelete (ankaŭ se al tio povas simili)? Se ĝi nek ŝuldiĝas al sulfata acido (laŭ kontraŭevidente subtenate de Vittorio Delfino Pesce)? nek al elektraĵ fenomenoj? Science oni eĉ ne povas hipotezi fulmobrilon devenantan el la mallumo de tombo aŭ eksplodo de nuklea energio taŭgaj fote impresi la tukon.

Kiu estas la bildo el si mem?

Ĝi devas havi materiecon. Certe ĝi estas materia bildo ankaŭ se ĝia materieco estas kvazaŭ nekaptebla.

Fotita, fakte, el la tuka malantaŭo (dorso), la fotofilmo ne lasas kiun ajn bildon kiel oni povas konstati el la foto laŭ "lumo transigita", dum oni vidas la brulaĵojn (tiuĵn de la incendio), la sangajn kaj akvaj makulojn. La bildo videbla en maldorsa flanko ne produktas kontraston: kvazaŭ ĝi estus senmateria.

Tio pri kio la ekspertoj ŝajnas nin certigi estas ke ĝi aperas senkolora (senbrulbruniga): la celulozo, en subtilega tavolo, sin modifis aŭ senkoloriĝis tiamaniere ke formiĝis sepkolora bildo (kun tonaloj inverse proporciaj al la distanco (de la korpo) el la tuko) aŭ, pliekzakte, formiĝis la premisoj por la kreiĝo de dudimensia bildo en la negativa foto aŭ tridimensia en la *elektronika analizilo porspacaj bildoj* de John Jackson kaj Eric Jumper (NASA, Colorado Springs) aŭ, multe pli klare, en la komputilo de Giovanni Tamburelli (CSELT, Torino).

La bildo, do, restas neeksplikata.




Tria: La origino de la bildo



Yves Delage, unua sin demandis kiamaniere povis sin formi tia bildo, aŭ pliprecize, kial tiuj informoj en la foto negativo tradukiĝas (al pozitivo) al bildo bone difinita.

Post tiom da studoj, hipotezoj, verifoj kaj eksperimentadoj la enigmo plurestas.

En la foto estas reprezentitaj la plejsignifaj rezultoj. Iuj hipotezoj estis apenaŭ formulitaj kaj neniam pruvitaj.



Kvara: Kial la mortotuka bildo estas aŭtenta



- 1- La mortotuko ne ŝajnas falsebla: neniu ĝis nun sukcesis produkti sozion.
- 2- La senekscepta manko de pigmento, koloro, verniso... La bildo ne estas aranĝita per kolorigo, sed per senkolorigo: sed la kielo estas nekonata.
- 3- La bildo estas enstampita inverse rilate la naturan dispozicion de nia okulo (= opta negativo): okazis inversigo de lumoj kaj mallumoj. Tial nur la fotografio en sia negativo rivelis la bildon kiu estis kaŝita kaj kiun la grandaj pentristoj ne kapablis deĉifri.
- 4- Komputero rivelis la tridimensiecon de la bildo kaj ties mankon de laŭdirekteco: afero ne eblas ĉe ĉiu ajn pentraĵfalsisto.
- 5- Ĉeestas informoj nevideblaj nudokule;
- 6- Ĉeestas krome diversaj informoj ne akordiĝeblaj kun la mezepoka kulturo:
 - la distingo inter vejna sango kaj arteria sango, kiel aperas en la sangaj makuloj (la distingo malkovriĝis nur en la 16a jarcento);
 - la sistemo de kronado per domoj montriĝas opona al la kutimo de pentristoj kaj skulptistoj;
 - la pernajla trapiko sur la pojnjoj kaj ne sur la polmo de la mano (krucumado estis leĝe abolicita de Konstanteno kaj ĝiaj uzmodoj forgesitaj): najlo surpolme enfiksita ne subtenas sed deŝiras la manon pro la trakcia pezo;
 - la malapero de la polekso kaŭzita de la kuntiriĝo de la mediano.

LA DATADO PER 14KARBONO:

- 1- Temas pri la unika ekstertona noto en la mortotuka koncerto.
- 2- Tiu datado ne negas la aŭtenton de la mortotuka bildo, sed kontraŭdiras la datadon de la tuko.
- 3- La ĉeesto de la mortotuko antaŭ la jaro mil estas pli ol dokumentita.
- 4- Ĝi ne povas esti mezepoka (vidu la antaŭan numeron 6.) kaj plue:
 - a) La specimeno estis prenita el unu flanko de la tuko kiu estis riparita per rekta alkroĉiĝo al antaŭaj fadenoj de la mortotuko: tio kunportis la senhomogenecon de la unuopaj mortotukaj pecoj liveritaj al la tri laboratorioj.
 - b) Rusa sciencisto Dimitri Koutznetsov montris ke la incendio de Chambéry povis rejunigi la 14Karbonon eĉ je mil jaroj, kaj do altiri iele la scienculojn al nekorekta datado, kiel jam okazis (vidu la mumion de Manchester - 1000 jaroj estis la tempdiferenco inter la ostoj kaj bendoj -; aŭ la peruvian katunon de 1200 pK., datitan en la laboratorio de Zurigo kun 1000 jaroj malsame ol la dato certa jam konita.



5- Ke la pruvo per la ^{14}K karbono estas, plue, manka je scienca konfido pro la antaŭaj anomalioj kiuj senvalidigas la rezultojn, dedukteblas ankaŭ:

- a) oni ne procedis blindmaniere kiel jam establitte de la protokolo, la laboratorioj nome ne devis antaŭscii kiu el la kvar specimenaj pecoj estis tiu mortotuka;
- b) kaj decida estas la cirkonstanco de la sciigiteco, al la tri laboratorioj, de la datado de la kontrolaj trispecimenoj kiuj devus atesti la fideindecon de la datado per ^{14}K . Tia sciigo igas la pruvon science nefidinda (la scienco ne estas konfido, sed konstato).
- c) laŭ la fakuloj pri statistiko, la mezuma aĝo de la mortotuka akirita ĉe la tri laboratorioj senas je valideco pro tio ke la laboratorio de Oxford trovis valoran, sur sia specimeno, rezulton kiu multe distanciĝas el tiuj de la aliaj du laboratorioj. Sublime de statistiko, tio signifas ke ne ekzistas homogeneco inter la tri mortotukaj specimenoj kaj do alfaciĝas 957 probablecoj sur 1000 ke la ^{14}K karbona datado ne estas reprezenta pri tiu de la mortotuko. NB: Williard Frank Libby estis la inventisto de ^{14}K karbona datado kaj pro tio li estis Nobelpremiita. Li mem fiksas la limojn de sia metodo, *apartajn rilate materialojn teksajn*.

Kvina: La sango de la homo de la Mortotuko

Franca Medicinisto Pierre Barbet estis la unua komencanto de la hamatologiaj esploroj sur la sangaj makuloj (1950). Li konstatis ke ili estas vere sangaj ĉar ili havas la karakterojn de sangaj grumeloj; ili, fakte, konservas karminkoloron pli/malpli intensan dum la sekigita sango fariĝas rapide nigra. La intenseco de la koloro rekte proporcias kun la korpeco de la grumelo; la makuloj montras kutime netajn konturojn; en la ikonografio ne troviĝas iu ajn tiapeca paralelo.

En 1969 kun la Komisiono ŝarĝita de kardinalo Pellegrino startas la aliro al kromaj studoj kiuj konfirmas la asertojn de Barbet. En 1981, Baima Bollone maje antaŭ la Torina Akademio de medicino, aŭguste la usonaj J. H. Heller ed A. D. Adler en la Universitato de McMaster de Hamilton komunikas ke mem sukcesis prui ke temas pri homa sango, katalogita poste kiel apartenanta al grupo AB ĝuste kiel la sango de Lanciano (kie la pano konventiĝis al karno kaj la vino al sango en 7a jarcento kaj kie konserviĝas ankoraŭ hodiaŭ) kaj kiel la sango de la Sudario de Oviedo (Hispanio, Asturioj).

Konklude, sur la Mortotuko troviĝas: homa sango de la grupo AB (grupo sufiĉe malofta, en Italio, ekzemple ne pli ol 5% de la loĝantaro); sango viva grumeliĝinta sekigita, vejna kaj arteria, perfekte konservita; sango multe sekigita, en dividita stato: la hemata parto separita el sereca parto (vundo sur la ripara flanko).



La mortotuko estas lina teksaĵo kun mezuro cm 436x110 (437x111), krepe teksita kun nobla aspekto kaj precioza.

Sesa: La Sudario de Oviedo

La sudario de Oviedo estas tola retangulo je cm 85,5 x 52,5 kaj troviĝas en Hispanio (Asturujoj). Ĝi videblas nur en la Sankta Vendredo kaj la 21an de septembro. La Sudario de Oviedo reirigas, kiel rezultas el dokumentoj, al la jaro 1075, dum kiu la reĝo Alfonso la 6a redaktis pri ĝi akto-inventarion, en kiu estas priskribita la malfermo de la Sankta Kesto, subskribitan kaj de la reĝo kaj de ties sekvantaro kaj de ekleziaj altranguloj ĉeestaj, atestantan ampleksan kvanton de relikvoj inter kiuj aperas, elstarege, la Sankta Sudario.

De tiu dokumento ne ekzistas la originalo sed kopio de la 12a jarcento, konservita en la arĥivo de la katedralo de Oviedo. Alfonso la 6a kovrigis la nunan Keston per arĝenta lameno, sur kiu estas ĉizita la dato en kiu oni finis la laboron: jaro 1113! Tiel ke tiu dato konstituas la plej, ĝisnun, antikvan datadon de la sama Kesto

Tiel fermita, la Kesto neniam malfermiĝis ĝis kiam la episkopo Diego Aponte de Quiñones (1585-1598) efektivigis novan agnoskon de la relikvoj, kiel atestite de Pedro de Cavañas kaj Maraŝon de Espinosa.

Post 1715 la relikvo estis ekspoziciita en la katedrala Ĉambro kune kun la aliaj relikvoj. Ĝis nun ĝi restis en tiu Ĉambro en kiu, spite de militaj ruinigoj, ĝin oni gardis en bona konserva stato. La polenoj trovitaj de Max Frei dokumentas la palestinan originon de la teksaĵo kaj ĝian vojaĝon tra NordAfriko ĝis la Asturia Lando de Hispanio.



Sepa: Mortotuko kaj Sudario

Vidpunkte de la teksmaniero, la tuko de Torino kaj la tolaĵo de Oviedo povas antikvi 2000 jarojn: la du tolaĵoj havas karakterizojn koincidantajn kun tiuj de proksimorienta medio de la unua jarcento.

Mortotuko: *strukturo spikoforma; pezo 23 mgr./cmq.*

Sudario: *strukturo ortangula; pezo 14,5 mgr/cmq*



Mortotuka teksaĵo (maldestre), sduaria teksaĵo (dekstre)

La du teksaĵoj tuŝis la saman vizaĝon ĉar la rekonstruita vizaĝa bildo sur la Sudario koincidas kun tiu de la Mortotuko kaj ankaŭ iuj sangaj makuloj analogas en la du tolaĵoj kiuj krome devenas el la sama landaro kiel atestas ALOO kaj POLENOJ identaj, tipaj de la Morta Maro kaj de la Mediteranea-Palestina zono.



La Sudaria vizaĝo rekonstruita spurante la sangajn makulojn



Oka: Komparo de la Mortotuko kun la Sudario



La rekonstruebla bildo sur la Sudario spurante la sangajn makulojn similas al la vizaĝo de la Mortotuko. Ne nur: se sur diapanan bildon oni surmetas sangan analogan makulon, ankaŭ la aliaj ĉeestaj makuloj surmetiĝas.

Surbaze de tiu fakto, spertuloj certigas, ke la mortotuka tolaĵo kaj tiu sudaria tuŝis la saman vizaĝon. Plue: la sudario servintus por doni poluradon al la vizaĝo antaŭ ol tiu ĉi estus envolvita en la Mortotuko, kaj oni ĝin ligintus ĉirkaŭ la kapo de Kristo por teni fermita la buŝon, kvazaŭ mentoŝrimilon.



Naŭa: La homo de la Mortotuko estis unuavide taksita lama.

En la mortotuka tolaĵo la dekstra kruro ŝajnas malpli longa ol la maldekstra (reale okazas la inverso), sed oni ne sciis la kialon. Oni opiniis ke Jesuo ekde la infanaĝo estis lama kaj sekve ikonografio lin reprezentis tiela, eĉ en la krucifikso de *Cimabue*, eĉ en tiu en Sankta Kruco de Florenco. La bildo estas formata ortangule kaj, do, ĝi ne projekcias la kurbiĝon de la maldekstra kruro kiu staris supermetita sur la dekstra. Konsekvence ĝi aperas pli mallonga kaj la piedoj malpli evidentiĝitaj (escepte de la kalkano kaj la piedklavo) ĉar apogigita sur la dekstra (vidu desegnaĵon).

Ankaŭ la bizanca maniero de '869 p.K. reprezentas Kriston kun la piedo subtila kaj inversigita laŭ 90 gradoj kompare al la alia. Tiaj reprezentaĵoj pri Kristo havas nenian alian eksplikatan originon krom la mortotuka bildo.



Deka: Moneroj sur la okuloj

En aŭgusto 1979, usona Francis L. Filas, profesoro ĉe la universitato de Ĉikago, malkovras ke la rondforma korpo sur la dekstra okulo de la mortotuka homo estas monero de la epoko de Pilato. La elementoj de la identiĝo de la monero (*lepton lituus*) estas la kurba bastono renversita (stamperaro) uzita de la paganaj aŭguristoj, kaj la sinsekvo de kvar literoj - UCAI - arke disponigitaj inter la 9.30 kaj la 11.30 horoj, kaj parto de la greka skribaĵo: TIBEPIOY KAICAPOC (de *Tiberio Cezaro*); sur la dorsoflanko legiĝas la dato (= 16a de Tiberio, nome 29-30 pK). Estas tamen stamperaro: C anstataŭ K. (Septembre 1972 oni trafis moneron samtipan kun la du stamperaroj kaj kun la sama LIS).

La ĉeesto de la monero estas konfermita de G. Tamburelli, M. Moroni (numismato), usonanoj R. Haralick kaj A. Wangher. Plie, oni trovas aliajn du monerojn. En 1996 P. Baima Bollone, Colombo, Balossino, Siracusa kaj Zacà komunikas dum la televida elsendaĵo "Mixer" ke mem sukcesis identigi monerojn ankaŭ sur la maldestra brovo de la mortotuka homo. Temas pri monero stampita de Poncio Pilato: *lepton simpulum*. La elementoj taŭgaj por la identigo estas: la simpulum (ĉerpilo por oferverŝo) kaj komenca kaj fina paro de la skribaĵo: TIB...LIS (de *Tiberio Cezaro jaro 16a*). Tiuj moneroj estis studitaj kaj identigitaj nur en la pasinta jarcento



Dekunua: La moneroj sur la tridimensia bildo

La ĉeesto de la moneroj en la tridimensia bildo de G. Tamburelli.

Tiupunkte ŝajnas nerefutebla la datado de la Mortotuko kaj ĝia deveno: palestina zono kaj proksime de la epoko de la morto de Kristo kiu, kiel jam dokumentite, okazis la sepan de aprilo de la jaro 30a aŭ la trian de aprilo de 33a pK.



Dekdua: La moneroj



La tri moneroj *dilepton lituus* erare stampitaj kun la kurbo de la lituus orientita maldekstren.



Stampa postlasaĵo sur la dekstra okulo simetria al tiu de la monero.



Lepton simpulum sur la dekstra okulo

La flanko stampita (sur la tuko) estas tiu dekstra kiu signas la daton: LIS (29/30 pK)

Dektria: La bildo de Kristo ĝis la 4a jarcento.

En la unuaj jarcentoj la bildo de Kristo en arto, pentraĵa kaj skulpta, montras vizaĝon libere inspiritan: kutime estis tiu de junulo ĉar oni volis simboli la ĉiaman junecon de la Resurektinto.

Estas fotitaj ĉi-sube, maldekstre la Bona Paŝtisto de Akvilejo (4a jarcento) kaj dekstre Kristo brakumanta la Krucon (Raveno, Maŭzoleo de Galla Placidia - 5a jarcento).



Dekkvara: Floroj ĉirkaŭ la vizaĝo de Kristo

La malkovro de iuj floraj fragmentoj sur glubendoj, uzitaj por elpreni polenojn, kunfirmas la hipotezon ke sur la torina Mortotuko oni metis palestinajn printempajn florojn, plejprobable en la momento de la entombigo.

Estis ankaŭ identigitaj spuroj de palestinaj floroj.

En elstaraj ikonoj, kiel en tiu de monto Sinaja, la aŭreolo de Kristo estas ornamita per floroj, kaj eĉ sur oraj moneroj de Mikaelo la 3a.

Israela botanikisto, Avinoam Danin, de la hebrea universitato de Jerusalemo, en kunlaboro kun Wangher de la Duke University, North Karolina, konfirmis la ĉeeston de palestinaj floroj kiuj eble oni lokigis ĉirkaŭ la kapo de la mortotuka homo



Dekkvina: Skribaĵo JESUS NAZARENOS

En majo 1994 estis submetita al la INSTITUT D'OPTIQUE D'ORSAY de Parizo la problemon de la deĉifro de la skribaĵoj fantomaj kiuj ŝajnis aperi sur la Mortotuko al la okuloj de diversaj esploristoj ekde 1980. La laboro de tiuj spertuloj pri digita legado de bildoj, André Marion kaj Anne-Laure Courage, per ennoviga Mikro-densitometro de ilia instituto, sukcesis elimini el la bildo la fortajn perturbojn kreitajn de la vefto kaj de la signoj de la stampita bildo, tiel ke evidentiĝis nur la skribaĵoj “fantomaj”.

Ilia esploro liveris interalie jenajn informojn:

- Laŭlonge de la maldekstra vizaĝa parieto vidiĝas la vorto NAZARH/ENOS (kiu en la greka oni legas NAZARENO;
- Submentone, iom oblikve, okulumas la grekaj literoj (I)HSOU(S) (jesùs).

Ĉio tio devigas pensi, ke la romia aŭtoritato certigis la morton metante la romiajn monerojn sur la okuloj, kaj la identecon de la ekzekutito skribante lian nomon super la tuko kiu vertikale envolvis la forpasinton.

La du eraroj en la vortoj *Jesùs* kaj *Nazarenos* (nome la 'H' [eta] anstataŭ la 'E' [epsilon]) (povus esti tamen ankaŭ 'E' en Nazarenos) povus esti signoj de aŭtentikeco kaj antikveco ĉar la vortoj *Nazarenos* kaj *Jesùs* ankoraŭ ne eniris la literaturan uzon kaj do estis libero de ortografia traduko. Tiu hipotezo solvas ankaŭ la problemon de la romianaj moneroj (kun paganaj simboloj) en entombigo kiu estas ankaŭ hebrea. La esploro ne estas finita sed apenaŭ komencita: necesas materie verifi la skribaĵon en la malantaŭo de la tolo kaj paleografie dedukti. Pluaj esploroj ĵus konfirmis la supozon





Deksesa: la unuaj moneroj kun la vizaĝo de Kristo

La unuaj moneroj kiun evidente portas la bildon de Kristo, prezentas vizaĝon kiu havas grandan similecon kun tiu de la Mortotuko de Torino kaj temas pri la *solidu aureus* (692) de Justiniano la 2a, kaj (843) pri monero de Mikaelo la 3a kaj (944) fine alia de Konstanteno la 7a Porfirogeneto. Elementoj komunaj: estas: la “rojeto” sur la fronto, la oreloj kaŝitaj sub la haroj, la 5 punktoj de la surmemtita bibldo.



Deksepa: La ikonoj

La reprezentado de la vizaĝo de Kristo estas dirata ikono (=bildo). Sed ekde la 6a jarcento la ikonistoj komencas sin konformigi al unu sola stampo: la akerotipa (*greke: acheiropoietos = ne farita de homa mano*) bildo de Edessa. Antaŭ ol esti akceptite pentri tiun bildon oni estis akurate selektita. La bildo de Edessa komprenigas kial de Jesuo en Oriento oni pentris nur aŭ prefere la vizaĝon.





Dekoka: La Sinaja Krista Vizaĝo

Flanke de la monto Sinaja, identigita de kristanoj kiel la monto de la Revelacio kaj Interligo, estis fondita de Justiniano la unuan monaĥejon. Tie troviĝas la granda vizaĝo de Kristo kiu estas la ikono plej antikva kaj plej bela inter tiuj certe eltirataj de la bildo de Edessa, kies trajtoj estas tiuj de la torina Mortotuko. Tio okazis ĉirkaŭ en 550.



Deknaŭa: Veronikoj en Okcidento

La ikonoj, nome la bildoj kun la nura vizaĝo de Kisto, en Okcidento, estas indikataj per la nomo de “Veronikoj” (vera ikono), aŭ “vualo de la Veronika”, aŭ ankaŭ la “sankta vizaĝo de Edesa. Kiel eblas observi, la dimensioj de tiuj vizaĝoj estas surmeteblaj sur la mortotuka vizaĝo. Al tiuj vizaĝoj dum Mezepoko oni aparte atentis kaj devotis kiel reeĥas en poeziaĵoj de Dante kaj Petrarka.



Surmetebleco de la bildoj kun la Mortotuko

Dante *Unua sanktjaro de 1300. Par XXXI, 36*
Kia pilgrim’ el Kroati’, veninta
eble por vidi Veronikan nian,
pro la malsat’ malnova ne satiĝas,
kaj diras pense, dum sin bildo montras:
“Sinjor’ Jesuo Kristo, Dio vera,
vizaĝo Via ĉu aspektis tiel?”
(trad. Giovanni Peterlongo)

Petrarca. *Dua Sanktjaro de 1350. Soneto*
“Sin movas la oldul’ neĝe blankhara...
kaj venas Romon altire puŝite
spekte kontempli aspekton de Tiu
kiun ankaŭ ĉiele vidi esperas.

Ankaŭ la krucifikso de Lucca (itala urbo) estas menciita de Dante. Temas pri ligna statuo devenanta el Oriento ĉirkaŭ la jaro 1000 kaj albordiĝinta al la katedralo de Lucca kie ankoraŭ troviĝas. La trajtoj de tiu vizaĝo estas certe mortotuka.

Dudeka: La vizaĝo de Kristo en la arto


Ĉi-sube estas projekciitaj la Kristajn vizaĝojn plej famajn en la granda arto: *Leonardo* (Lasta Vespermanĝo), laŭ multaj la plej bela; *Giotto* (Jesuo supreniras la Kalvarion: ĉarmanta rigardo, pasia); *Piero della Francesca* (Jesuo eliras el la tombo); *Mikelanĝelo* (Jesuo juĝisto), kiu tamen distanciĝas el la komuna maniero.

Maldekstre de la kvadrato, alte kaj malalte, vizaĝoj intence kaj rekte eltiritaj el la mortotuka negativo.



Dudekunua: Elektronikaj ellaboraĵoj

El la multaj elektronikaj ellaboraĵoj venkas certe tiu de *Johano Tamburelli* kiu, imitante usonaj *J. Jackson kaj E. Jumper*, realigis, sendepende kaj per malsama metodo, tridimensian bildon. La usonanoj jam malkovris fakte, ke la Mortotuko entenas ankaŭ la informon pri la tria dimensio ĉar la senkoloriĝo de la celulozo estas inverse proporcia al la distanco de la tolaĵo. Dum la 2a internacia kongreso pri sindonologio (mortotukologio) ili jam kunportis ankaŭ plastikaĵon informkonforman.



Dudekdua: Elektronika bildo purigita

La elektronika bildo de Tamburelli, purigita el ĉio kio povas agaci la mortotukan vizaĝon, efike serĉas la vizaĝon de antaŭ la prototuraj misformiĝoj.




Dudektria: Bildo elektronika

Tiu ĉi vizaĝo, kopiita el la fota mortotuka negativo fare de nekonata pentristo, estas, eble, la plej korekte realigita, ĉar krom la precizeco de mortotukaj trajtoj el ĝi li kaptis ankaŭ la esprimiĝon




Dudekkvara: Vizaĝo de Aggemian

La armena pentristo Aggemian sukcesis eble kapti la verajn trajtojn de Kristo vualita de la multaj lividaĵoj kaj sangmakuloj. La du vizaĝoj estas perfekte surmeteblaj kiel oni povas vidi ankaŭ en poŝtkarto



Dudekkvina: Fotoriliefio el la mortotuka negativo

Oni povas rimarki la tridimensiecon de la mortotuka bildo, akiritan ankaŭ per la fotografia tekniko de la tanĝa lumo (Realiĝis Aldo Guerreschi. Foto dekstra).



Dudeksesa: identigo de la homo de la Mortotuko

Diversaj esploristoj, kun kritika sinteno kaj celantaj penetri mortotukajn kaŝitaĵojn, sin demandis kaj sin demandas ĉu la bildo stampita sur la torina Mortotuko estas vere tiu de Jesuo Kristo. Kompreneble, ankaŭ tiu esploro, por ke ĝi povu atingi sciencajn valorojn, devas sin bazi ekskluzive sur objektivaj konstatoj. Kaj jen la aplikado de probablisko, flanke de prof. *Bruno BARBERIS* de la Universitato de Torino, kiu reelvokas kaj kompletigas la analizojn de *Yves DELAGE* (tute agnostika homo), Paul DE GAIL kaj Tino ZEULI. La esplora metodo, kvankam fundita sur absoluta scienca rigoro, sin bazas sur konsideroj tute simplaj.

Se iu ĵetas moneron, li havas unu probablecon sur du ($1/2$), ke videbliĝu la monera flanko elektita. Se oni ĵetas kubon, la probablecoj ke videbliĝu la flanko kun la nombro elektita estos unu el ses ($1/6$). Ĵetante al aero samtempe moneron kaj kubon, ĉar la du eventoj estas sendependaj unu de la alia, la probableco ke videbliĝu samtempe la monera flanko kaj la kuba surfaco elektitaj, estos unu el dekdu ($1/2 \times 1/6 = 1/12$)

Nu, ni konsideru la sep karakterojn plej signifajn komunajn al Jesuo de Nazareto (laŭ la evangeliaj rakontoj) kaj al Homo de la torina Mortotuko kaj ni vidu kiomaj estos la probablecoj ke tiuj karakteroj sin trovu samtempe kunigitaj sur unu sola homo kiu alfrontintus la krucmorton.

1. Kaj Jesuo kaj la Homo de la Mortotuko estis envolvitaj en mortotuko postmorte per krucumado. Konatas ke ne multaj krucumitoj povis ĝui regulan entombigon (temas pri la plej abomeninda puno, destinita nur por la sklavo, bandito, mortiganto, kiu daŭrigis postmorte pro la malŝato de la kadavro): $1/100$.

2. Kaj al Jesuo kaj al Homo de la Mortotuko estis kunpremitaj sur la kapo domo-kasko. Neniu historia dokumento memorigas tiun uzon. Ni limigu tian tre foran probablecon al unu el kvin mil: $1/5000$.

3. La patibulum (ekzekutiga ligno portata de la kondamnito) grave pezis sur la ŝultroj de la Homo de la Mortotuko kaj same sur tiuj de Jesuo: unu probableco el du: $1/2$.

4. Sama probableco ($1/2$) por la kielo per kiu estis fiksitaj al la kruca ligno la manoj kaj piedoj. Oni povis ilin fiksi per najloj kaj per simpla ŝnuro: ĉi-kaze ambaŭ per najloj: $1/2$.

5. La mortotuka tolaĵo elmontras vundon ĉe la dekstra flanko de la homo kiun ĝi envolvis. La evangelio de Johano (19,33-34) rakontas ke al Jesuo "... ili ne rompis liajn kruojn; tamen unu el la soldatoj per lanco pikis lian flankon, kaj tuj elvenis sango kaj akvo". Eble unu probableco el dek: $1/10$.

6. La Mortotuka Homo estis en tuko envolvita ĵus dekrucigita, sen iu ajn efektiva lavado kaj surkadavra unktado; la samo okazis al Jesuo, pro la alproksimiĝo de la hebrea Pasko dum kiu neniu manlaboro estis permesita: unu probableco sur dudeko: $1/20$.

7. La Mortotuko portas stampon de kadavro senputraĵa spuro. Tial, ĝi envolvis homan korpon kurtatempe, kaj tamen sufiĉe longe por ke enpremiĝu la stampo. La kadavro de Jesuo restis en la tombo tridek horojn ĉirkaŭ, ekde la vespero de vendredo ĝis la frua mateno de la dimanĉo. Estas eksterordinara unugormo kiu rajtigas atribui unu probablecon el kvincent: $1/500$.

El tiuj analizoj prof. Barberis rezultigis la entutan probablecon, kiu estas la produto de la unuopaj probablecoj konsideritaj. Jene:

$$\frac{1}{100} \times \frac{1}{5000} \times \frac{1}{2} \times \frac{1}{2} \times \frac{1}{10} \times \frac{1}{20} \times \frac{1}{500} = \frac{1}{200.000.000.000}$$

Agante laŭ la metodo de siaj antaŭuloj, Barberis povis dedukti ke “inter la 200 miliardoj de hipotezaj krucumitoj unusola povas esti posedanto de tiuj ĉiuj identaj karakterojn”. Realigas tiom perfekta konsonanco inter la evangelia rakonto de la pasiono de Jesuo kaj tio videbla en la Mortotuko ke, ŝirmite de la matematiko, ne ekzistas iu ajn reala probableco ke ĝi estis envolvinta kadavron malsaman ol tiu de Jesuo la Nazareta.



La nekonato de Lirejo

(Libere inspirita el “*La Mortotuko de Torino la Neebla Objekto*” de A. Cherpillod)

Temas pri la plej nekonata homo inter la personoj kiuj ekscitas la scivolemulojn de nia tempo. Oni rezignis doni al li nomon, lokdevenon, priskribi lian kulturan medion kaj eĉ fizikajn karakterizaĵojn, lasante tamen travidi lian eksterordinaran neenteneblan geniecon. Oni diras vage ke li vivis en la suda Francio inter la jaroj 1250 kaj 1360 de nia epoko.

Nekonata kiom oni volas; sed preciza en siaj intencoj kaj celoj kaj decida en sia farado. Ne superata, eble nesuperebla. Kion li intencis fari kaj reale faris?

1) Li volis efektiviĝi pentraĵon, realigi bildon de io komuna en komunaj aspektoj kaj per komunaj teknikoj. Komencis do kaj tuj li havis genian ideon, neniam elpensitan de iu ajn, eble eĉ neeblan: pentri *sen farboj* ĉiuspecaj. Neniu tion realigis ĝis tiam. Sentime li sin ĵetas en la entreprenon. Kaj sukcesas.

2) Rekomencas kaj li tuj okupatas de nova ideo: la pentraĵo senfarba estu ankaŭ *senkontura*! Oni scias, ke se la okulo de la pentristo ne difine vidas la konturojn, li ne kapablas labori apude de sia provata desegno: li devus sin distancigi je almenaŭ tri/kvar metroj. Eĉ en tio li sukcesas.

3) La ideoj sinsekvas kaskade. Senfarba, senkontura, lia imagita figuro realiĝu kaj do ne montruu, eĉ ne en la estonteco per pligrandigoj kaj rimedoj kiel iksoradioj aŭ ultraviolaj kaj ultraruĝaj (ĉu eĉ tiujn ĉi li antaŭkonis?), *la premtuŝadon* kaj la *direkton* de la peniko. En la historio, priarta aŭ pritekna, oni ne trovas tiutipajn ekzemplojn dum la ekspertoj instruas vidi, en ĉiu pentraĵo, la movojn kaj la direktiĝon de ĉiu peniktuŝo. Sed li senperturbe insistas kaj sukcesas.

4) Kaj jen alia tuja inventaĵo: la koloro, pliekzakte la malheliĝo, de la pentraĵo (ankoraŭ pentraĵo?), senfarba, senkontura, senpenika tuŝdirekto, restu nur *en la supraĵo de la teksaĵo* (li precizege baraktas super kvarmetra linaĵo longa kaj unumetra larĝa), estu penetrata de kvazaŭa kolordiluaĵo (pliekzakte: de nuancoj de klaroskuro) *de nur unu aŭ du mikronoj* kiun ĝisnun oni ne kapablas realigi. Oni notu ke teksaĵo ensorbiĝas je farboj ĝis entrempiĝo: alikaze la farbo deĝigas kaj la figuro disolviĝas; sed li neniam fiaskas kaj fakte rezultigas kolorigon kun malheliĝoj, kiuj forstrekiĝas eĉ ne kiam la teksaĵon oni lavas kaj vringas aŭ mergigas en ĉiuspecajn naturajn aŭ sintezitajn senkolorigilojn.

5) Ne finiĝas tamen la serio de liaj geniaj pretendoj. Venas fakte en lian kapon la jena kaprico: pentri ne nur senfarbe, senkonture, senpeniktuŝe, nur supraĵe malheligante, sed ankaŭ *negativece*. Neniu konceptis tiun ideon, neniu antaŭe komisiis tian manfaritaĵon, kiun eventuale neniu vidus sen taŭgaj iloj. Neniu, eĉ ne en la dudekunua jarcento, sukcesas realigi pentre tian figuron. En liaj tempoj neniu priparolis tian “negativan bildon”, kiu ne videblas nudokule. Li ne timas kaj sukcese kreas por ke kiam oni inventos sciencajn ilojn taŭgajn al la malkovro de tiuj nevideblaj karakterizaĵoj, oni vidu la mirindaĵon. Tiam, nur tiam, la “negativeco” de la bildo aperu. Kaj li persiste kaj sukcese procedas...

6) La bildo jam brilas antaŭ li, mankas nur kelkaj detaloj. Kaj jen eksplodas en li nova geniaĵo. Li estas realiganta komunan artan kaj popolan pentrobjektan, sed ĝia realigo ne simulu al tiuj kiuj ornamas la komunajn dekoraciatajn lokojn, kaj ignoru la pentraĵajn kurantajn detalojn de la objekto! Tiuj detaloj metas najlovundojn sur la polmoj (jes, pri krucumito li artas): li antaŭvidas, ke en la dudeka jarcento estos malkovritaj kadavroj kaj arkeologiaĵoj pri krucumitoj portantaj vundsignojn sur la pojnoj, kaj ke anatomiistoj de la XIX jarcento estos demonstrantaj eksperimente ke najlitaj manoj disŝiriĝus pro la pezo de la korpo. Kaj lin ne blokas la liatempa akuzo ke li detruas la tradicion, do konstruas falsiĝon. Li laboras por la estonteco!

7) Kaj la estonteco evidentigas aliajn dekojn da ekceptaĵoj. Li kreas *tridimensian figuron*, pri kiu li ne havas ideon, kaj kiun eĉ la modernaj posteuloj pentraĵe ne kapablas krei. Ne malhelpas ke la signoj de la tridimensio ne videblas nudokule. Venos la sciencoj kiuj ĉion detektos kaj tiam...

Tiam, nome hodiaŭ, oni detektas ke la materi bazo sur kiu li laboras estas, ja jes linaĵo, sed linaĵo teksita laŭ orienta maniero, nekonata en okcidento, kaj eble forgesita ankaŭ en liatempa oriento; sed li ĝin trovas (kie? kiel?) por ke la posteuloj ne diru ke li ne kapablas fantazii kaj fantaziigi. Kaj samtempe zorgas, ke inter la fadenoj de la linaĵo troviĝu, jes, spuroj de aliaj antaŭaj laboraĵoj kiel kotonfadenoj, sed neniel spurrestaĵoj de lanaĵoj: la rozulo scias (aŭ scias ke oni scios) ke lano kaj lino ne povas kunstari pro rigidaj religiaj motivoj: la teksilo kiu teksas linon ne traktu lanon por ke lanrestaĵo ne provoku malpuran miksaĵon!

8) Kaj kion pri la tiu ĉi lasta elpenaĵo? Li agas tiel, ke sur la linaĵon descendu *kaj daŭre kuŝu polenoj de mezorientaj plantoj*. Li nenion scias pri ekzisto de polenoj, kiuj cetere riveliĝas nur en observado per mikroskopo, ilo kiun lia geniece antaŭscias realigebla en estontaj jarcentoj. Kaj jen, tuta aro da dudek specoj de polenoj!

9) El la sennombraj intuicioj de tia nekonato, ankoraŭ plua. El la pojnoj najlotrapikitaj de la krucumito fluas sango: kompleneble, laŭ la antaŭbrakoj ĝis la skaplo formiĝas fluetoj. Se la krucumito ŝanĝus pozicion (por plilarĝigi la pulmojn kaj enspiri), ankaŭ la sangfluo ŝanĝus direkton. Kion faras tiam nia supergeniulo? *Li fluigas la sangon laŭ du direktoj* kiuj akutangule disetendas el la pojnvundo. Necesas scii, ke nia nedifinebla homo la sangon ne pentras (laŭ siastile, eventuale), sed klopodegas kredigi ke ĝi forfluas el la vundoj. Tie kaj tie li ŝprucigas sangerojn (el tiuj ĉi multaj nevideblaj nudokule), sub kiuj ni nun malkovras ke malĉeestas iu ajn kolorspurado. Li sukcesis ankaŭ, profitante la estontajn malkovrojn de Harvey (kiu desegnis la unua la cirkuladon de la sango XVII J.), reprodukti la malsamajn efikojn de la fluaĵo arteria kaj vejna, kaj, kiel moderna hematologo, li precipitigis la seron eksteren de la ruĝe sangaj pezaj korpoj kiuj, dum la sekiĝo, restas interne kaj sube.

10) Plue... oni ne forgesu ke en sia "penetraĵo" li faras falantaj la poleksojn. Ĉu li scias, en tiu epoko, ke la surpojnaj najloj fendas kaj rompas la nervon kiu regas la movojn de la polekso kaj ke tiu ĉi fatale neregate falas maninternen?

Haltu! Ke mi ne eniru aliajn ekceptaĵojn! Ke mi ne kredigu skribi sciencfikcie aŭ sciencefantaste! Ĉu li estas geniulo, la plej alta geniulo de la homaro? Aŭ ĉu li ne ekzistis, kvankam la geniaĵon oni povas vidi kaj kontroli kaj mantuŝi?

Oni diris (sed tio ne certas!) ke la mortotuko de Torino estas miraklo. Fantazio! Jen la vera miraklo: tiu nekonato konata de ĉiuj!

Kaj ĉiujn tiujn malkovraĵojn certe li transdonis al la fama objekto, kiun oni nomas Sindone (Sindone) de Torino.

Zecchin Armando